TELOPEO

Oficiala Organo de La Esperanto-Federacio de Nova Sud-Kimrujo

*Volumo 58, Numero 09, septembro 2023*

**Esperanto Domo, 143 Lawson St, Redfern, Sydney NSW 2016, Aŭstralio**
**Redaktoro: Dmitry Luŝnikov, Provleganto: Nicole Else**

## Jarkunveno de EFNSK

*Nicole Else, sekretario de EFNSK*

La jarkunveno de EFNSK okazis dimanĉon la 3an de septembro je la 10a horo matene. Nova estraro estis elektita. Chris Betcher kaj Andrew Spannenberg ne deziris esti reelektitaj, sed ni havas novan estraranon: Terry Manley.

**Prezidanto:** Jonathan Cooper,

**Vic-prezidanto:** Dmitry Lushnikov

**Sekretario:** Nicole Else

**Kasisto:** Alan Turvey

**Aliaj estraranoj:** Adam Levy, Terry Manley


## 108-a Universala Kongreso de Esperantistoj en Turino 2023

*Mark Rodowicz, membro de EFNSK*

Antaŭ kelkaj monatoj, mi havis la bonŝancon partopreni en la 108-a Esperanto Universala Kongreso (UK), la plej granda jara oficiala renkontiĝo de Esperantistoj en la mondo, kiu okazis ĉi-jare en Turino, Italio, inter la 29-a de julio kaj la 5-a de aŭgusto. Kiel relative novulo en Esperanto (mi lernis ĝin dum kelkaj jaroj, sed malregule), mi fine decidis aliĝi al la Esperanto-movado en Novsudkimrio kaj en Aŭstralio en decembro de la pasinta jaro. Mi ne antaŭe partoprenis Esperantajn kongresojn, sed mi tre volis tion fari, kaj mi konsideris, ke nun estis la plej bona tempo por fari tion. Kaj se mi intencas partopreni en Esperanta kongreso, kial ne en la plej granda kaj plej bona, la UK! Estis pli alloga al mi, ke la kongreso ĉi-jare okazis en Italio, lando kies kulturon kaj lingvon mi admiras, kaj ankaŭ ĉar mi neniam antaŭe vizitis la nordon de Italio, do granda ŝanco prezentiĝis al mi fari tion.



La kongreso estis bone organizita kaj bone partoprenita, kun 1321 partoprenantoj el 69 landoj (laŭ oficialaj statistikoj). Mi estis unu el 4 partoprenantoj el Aŭstralio kaj unu el du el Novsudkimrio. Multaj esperantistoj ĉe la kongreso surpriziĝis vidi aŭstralianon tie, konsiderante nian geografian distancon de Eŭropo, kaj diris al mi, ke mi devas esti tre fervora por fari la vojaĝon. Iliaj komplimentoj estis bonvenaj al tiu ĉi skribanto.



Iuj naciaj organizoj estis tre bone organizitaj. Mi impresiĝis de la Sud-Koreanoj, kiuj havis la sesan plej grandan reprezentadon inter partoprenantaj landoj kaj la plej grandan grupigon ekster Eŭropo. Ilia nombro kaj entuziasmo faris ilin rimarkeblaj ĉeestantoj. Ankaŭ rimarkeblaj estis kelkaj afrikaj partoprenantoj, precipe la Tanzanianoj. Kvankam relative malgrandaj en nombro, ili evidente volis fari sin rimarkeblaj ĉiutage, certigante, ke iliaj broŝuroj, kiuj propagandas ilian propran venontan kongreson en Aruŝo, Tanzanio, en 2024, estis videblaj kaj haveblaj por ĉiuj. La venonta UK en Aruŝo estos la unua en Afriko, historia evento, kiu signifas la evoluon de Esperanto sur kontinento, kie estas granda ebleco por pliigita kresko.



Mi interesiĝas pri Esperanta muziko, kaj mi havis la plezuron spekti vivajn prezentadojn de kelkaj muzikaj grupoj kaj artistoj, kiujn mi tre admiras, kiel ekzemple Kajto, Ĵomart kaj Nataŝa, JoMo, kaj ankaŭ kelkaj aliaj grupoj, pri kiuj mi malpli sciis. Bedaŭrinde, mi maltrafis la futbalan ludon, kiu okazis en Turino dum la kongreso inter Esperanto kaj "enmigrintoj el Peruo" sed mi ĝojis aŭdi (laŭ kio mi pensas estis fidinda fonto) ke Esperanto venkis 6-3 en tiu matĉo. (Ĉar mi neniam imagis Esperantan futbalteamon, tio estis interesa malkovro por mi).

Tamen, mi sukcesis profiti de Esperante organizitaj ekskursoj en la norda Italio kaj mendis 4 el ili. La plej memorindaj el ili estis mia vizito al Lago Maggiore (Majora Lago) [la dua plej granda lago en Italio] kaj Sacra di San Michele (Sanktejo de Sankta Mikaelo) kun ĝia fifama 'Scalone dei Morti' (Ŝtuparo de la Mortintoj).

Mi certe bone pasigis la tempon en mia unua UK kaj kuraĝigas aliajn aŭstraliajn esperantistojn forte konsideri partoprenon en tiuj kongresoj en la estonteco, se ili povas. Mi antaŭĝojas se UK okazos pli proksime al Aŭstralio, kaj speciale se estas ebleco partopreni en UK ĉi tie en Aŭstralio mem. Ni esperu, ke UK en Aŭstralio okazos antaŭ ne tro longa tempo.

## Kial mi voĉdonos "Jes" en la referendumo

*Jonathan Cooper, prezidanto de EFNSK*
*(La opinioj en tiu artikolo estas de mi mem.)*

Malgraŭ la argumentoj de la subtenantoj de "Ne", mi forte kredas, ke estos bone se la konstitucio de Aŭstralio estu ŝanĝata por agnoski la Indiĝenojn kiel la originalajn enloĝantojn kaj posedantojn de la lando, kaj por starigi konstantan Indiĝenan Voĉon (al la parlamento kaj registaro).

La ne-uloj ne estas unuigita grupo. Je unu flanko estas tiuj, kiuj kredas (aŭ volas, ke aliaj kredu), ke konstitucie protektata Indiĝena Voĉo donus al Indiĝenoj tro multe da povo, ke tio kaŭzus leĝan ĥaoson. (Kaj jes, bedaŭrinde, estas malgranda parto de tiu flanko, kiu estas rasista.) Je alia flanko estas tiuj, kiuj asertas, ke tia Voĉo farus nenion, ke ĝi estus kiel sendenta tigro. Iufoje unu flanko prunteprenas

argumenton de la alia, ekzemple, ke la Voĉo estus alia tavolo de burokratismo, konsilo de la "kanbera elito", kvankam tio estas la preciza malo de la ideo malantaŭ la Voĉo.

La memorebla frapfrazo de la ne-uloj estas "Don't know? Vote no" (Ĉu vi ne scias? Voĉdonu 'ne'). Krom la fakto, ke la evidenta respondo al nescio estas ekscii, la bazo de tiu argumento estas, ke la Laborista registaro (kiel la ĉefa proponanto de la jes-voĉdono) ne donas sufiĉajn detalojn pri kiel la Voĉo funkcius. Tamen, tiu manko de detaloj estas esenca parto de la propono. La konstitucio de Aŭstralio donas nur ĝeneralajn principojn de regado. La detalojn ellaboras la parlamento. Do, eĉ se la Laborista Partio priskribus detalojn pri, ekzemple, kiom da homoj estus en la Voĉo, kiel ili elektiĝus, ktp, la parlamento (kaj estontaj parlamentoj) decidus pri tiuj detaloj. Alivorte, iu nuna priskribo eble estus, aŭ ne estus, la realo. Multe surprizus min se la Koalicio de Liberalaj kaj Naciaj Partioj ne scius tion.

Tiu ideo (havi konstitucie protektitan Indiĝenan Voĉon) ne estas nova. Pluraj aliaj landoj (inkluzive, ekz-e, Finnlando) havas tian sistemon dum multaj jaroj. Kaj iliaj sistemoj de regado ne falis en ĥaoson. Tiuj alialandaj voĉoj funkcias pli malpli same kiel la nuna proponata skemo: la grupo faras petojn kaj sugestojn al la landa parlamento, kaj tiu parlamento aŭ akceptas aŭ malakceptas – aŭ parte akceptas – la rekomendojn. La ĉielo ne falis.

Eble, Indiĝena Voĉo ne multe aŭ rapide plibonigos la vivojn de Indiĝenoj (por "fermi la breĉon"),
sed ĝi estus bona komenco. Do...



## Kelkaj ne-emaj pensoj

*Alan Turvey, direktoro de EFNSK*
*(La opinioj en tiu artikolo estas de mi mem.)*

Jam estis multaj indiĝenaj voĉoj. La problemo estas, ke la registaro ne sufiĉe bone aŭskultis. Mono ne iris tien, kie ĝi estis bezonata pro la niveloj de korupto. La Voĉo ripetos la fiaskon de ATSIC ŝtatigante nacian instancon por solvi problemojn kiuj devus esti traktitaj je lokaj komunumoj kaj ekzistantaj registaraj estaĵoj. ATSIC estis dissolvita pro siaj problemoj. Tiu povis okazi nur ĉar la parlamento povis fari tion (kaj faris tion ambaŭpartie). Se La Voĉo ne funkcias, eĉ la parlamento ne povus forigi ĝin ĉar ĝi estus sanktigita en la konstitucio, Estas multaj indiĝenaj nacioj, sed nepre nur malmultaj ricevos rektan reprezentanton kun Voĉo. Se La Voĉaranoj estos decidataj de la registaro (kion ni ne scias) ĝi fariĝos maniero por la registaro puŝi tiun, kiun ili volas, donante al ili troan potencon.

Konstitucia ŝanĝo estas malfacila kaj eĉ se ni pensas, ke iu parto de la komunumo bezonas helpon je la nuna periodo, tio povas ŝanĝiĝi dum kelkaj generacioj. Hipoteze mi ne pensas, ke niaj nepoj komprenos kial iliaj pli riĉaj najbaroj ricevas voĉon sed ili ne. Aŭ kial rasa malplimulto ricevas voĉon, sed seksa malplimulto, aŭ handikapita malplimulto, aŭ malriĉa enmigrinta klaso ne ricevas Voĉon. Indiĝenoj kun kiuj mi parolis emas "Nei" sed preferus tute ne havi la referendumon ĉar ambaŭ respondoj (Ne aû malne) kaŭzos pli da rasismo. La konstitucio traktu ĉiun homon egale.

La fona informo de la Deklaro de la Koro dokumento, konservita sekrete nun haveblas nur danke al FOI. Ĝi indikas planon por doni multe da potenco al internaciaj instancoj kiuj ne estas demokratie elektitaj de Aûstralianoj.

En la pli granda bildo, la tuta debato eble estas malatentigi de la lastatempaj eksternormalaj mortoj, kaj la senĉesaj novaj sociaj kontrolaj mezuroj kiel kontrolebla cifereca valuto, orwelliana "surreta sekureco") kiuj estas baldaû enkondukitaj en Aŭstralio kiel jam okazis en aliaj landoj.

La koncepto de Voĉo por speciala grupo nepre kaŭzos rasan dividon ĉar ĝi estas esence rasisma. Konstitucio devas ekzisti sen dividemo.

## Ŝakludkonkurso

*Dmitry Lushnikov, direktoro de EFNSK*




La 14-an de oktobro en la Esperanto-domo okazos Ŝakludkonkurso. Kam Lee venos al Sidnejo por partporeni ĝin. La konkurso estas organizita triafoje.

Komenctempo: 14:00- registrado, 14:30 - komenco

Nombro da Vicoj: 3 (ludoj en grupoj, duonfinalo, finalo)

Komenctempo de ĉiu vico:
14:30 - grupoj, 17:00 - duonfinalo, 18:30 - finalo

Tempsistemo: 15 minutoj por ludanto

Bonvolu aliĝi, se interesas vin partopreni:
https://www.meetup.com/esperanto-in-sydney/events/296199993/

EFNSW: Esperanto Domo, Unua Dimanĉo de la monato estrarkunsido 09:00 ĝis 11:00
Kontaktu Jonathan Cooper 0403 358 941

Manlia Esperanta Klubo ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno
1a kaj 3a Sabatoj; 10:00 atm; Komencantoj Bonvenaj
Kontaktu Roger (02) 9976 6320 *manly@esperanto.org.au*

La Meza Marborda Grupo: 3a Dimanĉo de la monato; kontaktu Joanne (02) 4362 8287
Novkastelanoj: Kontaktu Andrew (02) 4951 2084 *newcastle@esperanto.org.au*

La Suda Marborda Grupo; malgranda grupo kunvenas foje je Bega.
Komencantoj Bonvenaj. Penny Vos (02) 6495 2922

La Esperanto Federacio de Nova Sud-Kimrujo:
Esperanto Domo,
143 Lawson St, Redfern 2016 (02) 9319 4775;
Malfermata ĉiun merkredon, 10:00 – 20:00
*(Sonigu elektran zumilon ĉe la strato)*
www.instagram.com/esperanto_nsw/
www.facebook.com/EsperantoNSW/
www.EsperantoHouse.org.au
retadreso: *nsw@esperanto.org.au*




| | |
|---|---|
| Prezidanto: | Jonathan Cooper |
| Vic-prezidanto: | Dmitry Luŝnikov |
| Sekretario: | Nicole Else |
| Kasisto: | Alan Turvey |
| Estraranoj: | Adam Levy, Terry Manley |